

Friedrich Schiller,
Garantio

tradukita de Vasiliĵ Devjatnin

Damon' unu fojon mallaŭte trairis
Kun akra tranĉilo sub bask' al tirano –
Al Dionizio, – sed unu gardano
Lin kaptis subite. Tiran' al li diris :
« Pro kio vi al mi, fripono, aliris? »
– Mi sanktan promeson ekvolis plenumi . . .
–
« Krimulo! mi tuj vin ordonos krucumi! »

– Jam longe mi estas al mort' pretigita,
Kaj, kredu, ne diros mi eĉ unu vorton
Pro mia pardono, ĉar havas mi forton,
Por morti sur kruco; sed se inklinita
Vi estas al bono, – ho, estu donita
Al mi kelka tempo, por fraton edzigi, –
Ĉe vi do mi povas amikon restigi. –

Kruele ekbrulis tirana rigardo,
Kaj diris li post la silento momenta :
« Tre bone, kun tio mi estas konsenta;
Sed tamen memoru vi tion, bastardo,
Ke vian amikon mi tenos sub gardo
Ne pli, ol tri tagoj, – kaj poste li mortos,
Al vi li per tio pardonon alportos. »

Al sia amiko Damono alvenis
Kaj diras : « tiran' min aljuĝis krucumi,
Ĉar volis mi sanktan promeson plenumi . . .
Kaj mi nur tri tagojn ricevi elpenis,
Por fraton edzigi . . . » kaj li ĉirkaŭprenis
Amikon kaj petas : « ho, restu, kurulo,
Vi por garantio ĉe malbonegulo! »

Amiko volonte konsentis kaj restis
En malliberejo li por garantio,
Kaj tuj liberigis Damonon per tio . . .
Damono edziĝon de frato forfestis,
En tria mateno tre frue sin vestis
Kaj vojon rapidas, malfrui timante
Kaj ĉiam pri sia amiko pensante . . .

...

Friedrich Schiller,
Die Bürgschaft

Zu Dionys, dem Tyrannen, schlich
Damon, den Dolch im Gewande:
Ihn schlugen die Häscher in Bande,
“Was wolltest du mit dem Dolche? sprich!”
Entgegnet ihm finster der Wüterich.
“Die Stadt vom Tyrannen befreien!”
“Das sollst du am Kreuze bereuen.”

“Ich bin”, spricht jener, “zu sterben bereit
Und bitte nicht um mein Leben:
Doch willst du Gnade mir geben,
Ich flehe dich um drei Tage Zeit,
Bis ich die Schwester dem Gatten gefreit;
Ich lasse den Freund dir als Bürgen,
Ihn magst du, entrinn' ich, erwürgen.”

Da lächelt der König mit arger List
Und spricht nach kurzem Bedenken:
“Drei Tage will ich dir schenken;
Doch wisse, wenn sie verstrichen, die Frist,
Eh' du zurück mir gegeben bist,
So muß er statt deiner erblassen,
Doch dir ist die Strafe erlassen.”

Und er kommt zum Freunde: “Der König gebet,
Daß ich am Kreuz mit dem Leben
Bezahle das frevelnde Streben.
Doch will er mir gönnen drei Tage Zeit,
Bis ich die Schwester dem Gatten gefreit;
So bleib du dem König zum Pfande,
Bis ich komme zu lösen die Bande.”

Und schweigend umarmt ihn der treue Freund
Und liefert sich aus dem Tyrannen;
Der andere ziehet von dannen.
Und ehe das dritte Morgenrot scheint,
Hat er schnell mit dem Gatten die Schwester ver-
eint,
Eilt heim mit sorgender Seele,
Damit er die Frist nicht verfehle.

...

Subite tre forta ventego fariĝis,
 Kaj tondro kaj fulmo kaj granda pluvego;
 Pli forte, pli brue koleras ventego, –
 Kaj jen riveretoj de mont' ekruliĝis,
 Riveron plenigis, kaj ĝi ekondiĝis . . .
 Damono al ponto rapidas de monto
 Kaj vidas, ke estas rompita jam ponto.

Li vagas sub pluvo sur bord' de rivero,
 Kaj tre malproksime li vidas dometon;
 Li krias, li vokas, li petas ŝipeton :
 Sed vane, – neniŭ ĉar kun malespero
 Ekvolis batali kun brua rivero . . .
 Kaj baldaŭ rivero jam aliformiĝis :
 Ĝi tute je maro simila fariĝis.

Kaj jen lian koron plenigis doloro,
 Li ploras, antaŭen li manojn etendas,
 Kaj preĝon varmegan al Zeŭso li sendas :
 « Kompatu! » li petas kun granda fervoro –
 « Kaj min ekrigardu kun dia favoro!
 Se al Sirakuzoj vi min ne alportos,
 Ho! . . mia amiko senkulpe ja mortos! »

Sed vane kompaton de Zeŭso li petas :
 Ventego kaj ondoj kaj pluv' ne ĉesiĝas.
 Sed ĉiam plifortaj, teruraj fariĝas, –
 Kaj tempo forpasas . . . Damono formetas
 De si sian veston, kuraĝe sin ĵetas
 En bruon riveron kaj naĝas, tranĉante
 Per brusto nur ondon, kun mort' batalante.

Kaj jen li sur bordo jam estas, – elŝiris
 Sin tute el brakoj teruraj de morto,
 Kun granda dankem' al favoro de sorto,
 Rapidas li plu . . . Sed subite eliris
 El granda arbaro rabistoj. Aliris
 Al ili Damono, – kaj ili malpace
 Ĉirkaŭas lin tute, rigardas minace.

...

Da gieŝt unendlicher Regen herab,
 Von den Bergen stürzen die Quellen,
 Und die Bäche, die Ströme schwellen.
 Und er kommt ans Ufer mit wanderndem Stab,
 Da reißet die Brücke der Strudel hinab,
 Und donnernd sprengen die Wogen
 Des Gewölbes krachenden Bogen.

Und trostlos irrt er an Ufers Rand:
 Wie weit er auch spähet und blicket
 Und die Stimme, die rufende, schicket.
 Da stößet kein Nachen vom sichern Strand,
 Der ihn setze an das gewünschte Land,
 Kein Schiffer lenket die Fähre,
 Und der wilde Strom wird zum Meere.

Da sinkt er ans Ufer und weint und fleht,
 Die Hände zum Zeus erhoben:
 "O hemme des Stromes Toben!
 Es eilen die Stunden, im Mittag steht
 Die Sonne, und wenn sie niedergeht
 Und ich kann die Stadt nicht erreichen,
 So muß der Freund mir erleichen."

Doch wachsend erneut sich des Stromes Wut,
 Und Welle auf Welle zerrinnet,
 Und Stunde an Stunde entrinnet.
 Da treibt ihn die Angst, da faßt er sich Mut
 Und wirft sich hinein in die brausende Flut
 Und teilt mit gewaltigen Armen
 Den Strom, und ein Gott hat Erbarmen.

Und gewinnt das Ufer und eilet fort
 Und danket dem rettenden Gotte;
 Da stürzt die raubende Rotte
 Hervor aus des Waldes nächtlichem Ort,
 Den Pfad ihm sperrend, und schnaubet Mord
 Und hemmet des Wanderers Eile
 Mit drohend geschwungener Keule.

...

« Ho, kion vi volas, krimuloj? li diris :
 Ankoraŭ ne scias, friponoj, vi tion,
 Ke mi, nur krom vivo, jam havas nenion!
 Sed vivo – ne mia! » Kaj tuj li aliris
 Al ili, bastonon de unu elŝiris,
 Per ĝi li eksvingis, kaj tri li mortigis,
 Aliajn do ĉiujn facile forigis.

Sed suno post pluvo varmege bruligis
 Migranton, kaj tute li perdis jam forton;
 Kun granda teruro atendis li morton, –
 Kaj preĝis li Zeŭson : « vi min liberigis
 El ondoj bruegaj, de mi vi forigis
 Rabistojn, – ĉu tie ĉi devas suferi
 Mi vane kaj morti, amikon oferi?! . . . »

Subite li aŭdas, kvazaŭ murmuretas
 Ne tre malproksime malgranda rivero!
 Rapide sin turnas al ĝi kun espero
 Damono – kaj vidas, ke fonto fluetas.
 Al ĝi superforte li tuj alvagetas,
 Soifon brulegan kun ĝoj' kvietigas
 Kaj korpon malsanan en ĝi li freŝigas.

Jam suno varmega majeste subiras
 Kaj ombroj tre longaj kuŝiĝas sur tero :
 Tre baldaŭ jam venos trankvila vespero.
 Sur vojo al urb' du migrantoj jen iras,
 Damono do ilin en voj' preteriras.
 Migrantoj parolas, Damono aŭskultas
 Kaj aŭdas : « lin oni jam nun ekzekutas! »

Tumulto piedojn al li flugiligas,
 En lia animo – senfinaj teruroj
 Kaj jen Sirakuzoj ! Nur suprojn de turoj
 Malalta jam suno facile origas :
 Jam estas vespero! . . kaj li rapidigas
 Ankoraŭ pli paŝojn, – kaj vidas – en strato
 Renkontas lin lia servant' Filostrato.

...

“Was wollt ihr?” ruft er vor Schrecken bleich,
 “Ich habe nichts als mein Leben,
 Das muß ich dem Könige geben!”
 Und entreißt die Keule dem nächsten gleich:
 “Um des Freundes willen erbarmet euch!”
 Und drei mit gewaltigen Streichen
 Erlegt er, die andern entweichen.

Und die Sonne versendet glühenden Brand,
 Und von der unendlichen Mühe
 Ermattet sinken die Kniee.
 “O hast du mich gnädig aus Räubershand,
 Aus dem Strom mich gerettet ans heilige Land,
 Und soll hier verschmachtet verderben,
 Und der Freund mir, der liebende, sterben!”

Und horch! da sprudelt es silberhell,
 Ganz nahe, wie rieselndes Rauschen,
 Und stille hält er, zu lauschen;
 Und sieh, aus dem Felsen, geschwätzig, schnell,
 Springt murmelnd hervor ein lebendiger Quell,
 Und freudig bückt er sich nieder
 Und erfrischt die brennenden Glieder.

Und die Sonne blickt durch der Zweige Grün
 Und malt auf den glänzenden Matten
 Der Bäume gigantische Schatten;
 Und zwei Wanderer sieht er die Straße ziehn,
 Will eilenden Laufes vorüber fliehn,
 Da hört er die Worte sie sagen:
 “Jetzt wird er ans Kreuz geschlagen.”

Und die Angst beflügelt den eilenden Fuß,
 Ihn jagen der Sorge Qualen;
 Da schimmern in Abendrots Strahlen
 Von ferne die Zinnen von Syrakus,
 Und entgegen kommt ihm Philostratus,
 Des Hauses redlicher Hüter,
 Der erkennt entsetzt den Gebieter:

...

– Revenu, ĉar ĉio jam estas finita! –
 Li diris malgaje : en urbon ne iru,
 Mi petas vin, el Sirakuzoj foriru!
 Li estas jam al ekzekuto metita.
 Li kredis sen fin', ke li estos trompita
 Neniam de sia amik', kaj nenio
 Lin povis devigi ne kredi je tio. –

« Ho, se jam malfrui al mi estas sorto,
 Kaj se mi ne povas de mort' liberigi
 Amikon, – mi devas min ankaŭ mortigi :
 Tirano ne diru, ke kuris de morto
 Mi nur dank' al mia anima malforto!
 Al vi mian vivon volonte mi cedas,
 Sed sciu, ke homoj kaj amas kaj kredas! »

Vespere Damon' Sirakuzojn eniras
 Kaj vidas, ke kruco sur placo jam staras,
 Kaj oni jam tute amikon preparas,
 Por lin ekzekuti . . . Kun forto traŝiras
 Amason popolan Damono kaj diras :
 « Mi morton deziris de Dionizio, –
 Mi estas krimulo, li – nur garantio !

En granda mirego popol' silentiĝis
 En ĝojo amikoj sin tuj ĉirkaŭprenas
 Kaj ploras, – pri kio – neniu komprenas,
 Sed larmoj el ĉiuj okuloj ruliĝis
 Minaca tirano pri ĉio sciigis;
 Li je amikeco ilia tre miras
 Kaj veraĵn amikojn li vidi deziras.

Kaj jen ili venas. Kun vido afabla
 Tirano renkontas amikojn kaj diras :
 « Vi venkis min tute, je vi mi tre miras!
 Mi estas ankoraŭ por amo kapabla,
 Kaj se mi ne estas al vi malagrabla,
 Permesu al mi, ke en ligo mi via,
 Amikoj varmegaj, por vi estu tria! . . . »

...

“Zurück! du rettetest den Freund nicht mehr,
 So rette das eigene Leben!
 Den Tod erleidet er eben.
 Von Stunde zu Stunde gewartet' er
 Mit hoffender Seele der Wiederkehr,
 Ihm konnte den mutigen Glauben
 Der Hohn des Tyrannen nicht rauben.”

“Und ist es zu spät, und kann ich ihm nicht,
 Ein Retter, willkommen erscheinen,
 So soll mich der Tod ihm vereinen.
 Des rühme der blut'ge Tyrann sich nicht,
 Daß der Freund dem Freunde gebrochen die Pflicht,
 Er schlachte der Opfer zweie
 Und glaube an Liebe und Treue!”

Und die Sonne geht unter, da steht er am Tor,
 Und sieht das Kreuz schon erhöht,
 Das die Menge gaffend umstehet;
 An dem Seile schon zieht man den Freund empor,
 Da zertrennt er gewaltig den dichten Chor:
 “Mich, Henker”, ruft er, “erwürgt!
 Da bin ich, für den er gebürgt!”

Und Erstaunen ergreift das Volk umher,
 In den Armen liegen sich beide
 Und weinen vor Schmerzen und Freude.
 Da sieht man kein Auge tränenleer,
 Und zum Könige bringt man die Wundermär';
 Der fühlt ein menschliches Rühren,
 Läßt schnell vor den Thron sie führen,

Und blicket sie lange verwundert an.
 Drauf spricht er: “Es ist euch gelungen,
 Ihr habt das Herz mir bezwungen;
 Und die Treue, sie ist doch kein leerer Wahn -
 So nehmet auch mich zum Genossen an:
 Ich sei, gewährt mir die Bitte,
 In eurem Bunde der Dritte!”

...

*Traduko de la Germana poemo “Die Bürgschaft” de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, *1759 – †1805) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (*1862 – †1938).*

Arg-1016-2058 (2014-05-20 13:25:34)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin. La poem-esperantigo troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, *1759 – †1805).*

Arg-1016-2057 (2014-05-20 13:28:47)

Pri la poeto Friedrich Schiller vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Schiller. Pri la poemo vidu la retejon <http://www.kombu.de/buergsch.htm>.